

Se mi povus ankoraŭfoje vivi...

Karaj gefratoj,

tian demandon verŝajne jam multaj starigis al si. Ne tre multaj estas plene kontentaj pri sia vivo, tiel la aktuala, kiel ankaŭ la jam pasinta. Samtiel multaj sin kun granda zorgo demandas, kio pri morgaŭ, surbaze de tio, kio okazis hieraŭ. Estas jam pli ol duonjarcento, kiam la fama kanzongenio Edith Piaf kantis sian „*Non Je Ne Regrette Rien*” (Ne, mi bedaŭras nenion). La teksto fariĝas eĉ pli problemhava en kontinuo: „*Ni le bien, qu'on m'a fait / Ni le mal, tout ça m'est bien égal!*” (Nek la bonon, kiun mi faris nek la malbonon, ĉio-ĉi estas por mi egale). Edith Piaf ĝuas renomon de klasikulo, sed en tiuj versoj oni povas legi la tutan moralan dekadencan de la eŭropa homo, kia akumuligis ĝis niaj tagoj. Ne bedaŭri malbonon, kiun mi faris – ĉu oni povas pli klare ribeli kontraŭ Dio, kiun ĝuste tion ĉi, nome la bedaŭron, la penton pro la farita malbono, de mi atendas? Estas malfacile komprenebla paradokso, ke tiel kortuŝa kanzono elbuŝe de kanzonistino, kiu konkeris korojn de milionoj sur la kontinento, fakte estas vera manifesto de la de Dio defalinta kaj kontraŭ Dio kaj konsekvence ankaŭ kontraŭ la proksimulo ribelanta homo. Temas pri vera himno de la eŭropa homaro, kiu en la dimensio kiel neniam antaŭe sin deturnis de Dio! Por forigi eventualan miskomprenon. Mi per tio ne volas kritiki la grandan kantistinon, kies sonbendojn kaj sondiskojn mi kun granda ĝuo metas en miajn aparatojn por almenaŭ redoni la etoson de tiu por ĉiam jam pasinta tempo, kiam la kvalito ankoraŭ estis kategorio en artaj verkoj. Mi ne scias, ĉu ŝi konsciis pri vera signifo de la kantataj vortoj, kiel mi ankaŭ ne scias, kian rilaton al Dio, ni diru pli precize, kun Jesuo Kristo, ŝi persone havis. Tio estas ekskluzive afero de ŝi kaj ŝia transcenda Juĝisto. Per ŝia kanzono mi nur volis ilustrati la „spiriton de l' tempo”, palpi la pulson de la moderna homo, por ne diri de la postmoderna.

Se parto de homoj alprenas la pozicion bedaŭri nenion, kiel kantis Edith Piaf, senrigarde, ĉu ŝi en sia vivo vere tiel kredis kaj procedis, troviĝas alia parto kun alternativa ekstremo: ili bedaŭras ne nur ĉion malbonan, kiun ili faris, ili bedaŭras eĉ la puran fakton, ke ili vivas, ke ili tute ekzistas. Tiel la plej granda malnovgreka tragedio Sofoklo (Sophokles, 496-406) eldiris frazon, kiu lin faris granda eksistencialisto du mil kaj duonon da jaroj antaŭ la eksistencialistoj francaj, kies kanzona esprimo estis ankaŭ Edith Piaf: „*Neniam esti naskita estas deziro la plej granda, kaj se vi jam vivas, estas la sekva, rapide foriri tien, de kie vi venis.*” Tiu konstato de la plej granda vortartisto de la greka antikvo apud Homero, estis dirita ne en la tempo de moderna industria kaj kapitalisma frustrado, sed en la tempo de malrapida, ankoraŭ tre kun naturo kongrua vivo en pura medio – ne vivo de greka sklavo, sed de greka privilegiulo!

Se iu eble objetos: Ho jes, ja temas pri tipe pagana tragedisto, kiu ne konis veran Dion kaj tiel ankaŭ ne povis koni veran vivkonsolon, mi devas tuj citi el unu el plej kortuŝaj kaj vivprofundaj libroj el la Malnova testamento, el la libro de Hiobo, kies rolulo konis la veran Dion kaj havis kontakton kun la fonto de vera konsolo. Sed en certa momento de sia vivo, de la elprovo, en kiun li estis allasita de Dio, li diras la samon kiel la greka pagano, kaj pli ol la samon:

„Pereu la tago, en kiu mi naskiĝis, kaj la nokto, kiu diris: embriiĝis homo.

Tiu tago estu malluma; Dio de supre ne rigardu ĝin, neniu lumo ekbrilu super ĝi.

Mallumo kaj tomba ombro ekposedu ĝin; nubo ĝin kovru; eklipsoj de tago faru ĝin terura.

Tiun nokton prenu mallumego; ĝi ne alkalkuliĝu al la tagoj de la jaro, ĝi ne eniru en la kalkulon de la monatoj.

Ho, tiu nokto estu soleca; neniu ĝojkrio aŭdiĝu en ĝi.

Malbenu ĝin la malbenantoj de la tago, tiuj, kiuj estas pretaj eksciti levjatanon.

Mallumiĝu la steloj de ĝia krepusko; ĝi atendu lumon, kaj ĉi tiu ne aperu; kaj la palpebrojn de matenruĝo ĝi ne ekvidu;

pro tio, ke ĝi ne fermis la pordon de la utero de mia patrino kaj ne kaŝis per tio la malfeliĉon antaŭ miaj okuloj.

Kial mi ne mortis tuj el la utero, ne senviviĝis post la eliro el la ventro?

Kial akceptis min la genuoj? Por kio estis la mamoj, ke mi suĉu?

Mi nun kuŝus kaj estus trankvila; mi dormus kaj havus ripozon,

Kune kun la reĝoj kaj la konsilistoj sur la tero, kiuj konstruas al si izolejojn,

aŭ kun la potenculoj, kiuj havas oron, liuj plenigas siajn domojn per arĝento;

aŭ kiel abortitaĵo kaŝita mi ne ekzistus, simile al la infanoj, kiuj ne vidis lumon.

Tie la malpiuloj ĉesas tumulto; kaj tie ripozas tiuj, kies fortoj konsumiĝis.

Tie la malliberuloj kune havas ripozon; ili ne aŭdas la voĉon de premanto.

Malgranduloj kaj granduloj, tie ili estas; kaj sklavo estas libera de sia sinjoro.

Por kio al suferanto estas donita la lumo, kaj la vivo al tiuj, kiuj havas maldolĉan animon,

kiuj atendas la morton, kaj ĝi ne aperas, kiuj elfosus ĝin pli volonte ol trezorojn,

kiuj ekĝojus kaj estus ravitaj, se ili trovus tombon?

Al la homo, kies vojo estas kaŝita, kaj antaŭ kiu Dio starigis barilon?

Antaŭ ol mi ekmanĝas panon, mi devas ĝemi, kaj mia plorkriado verŝiĝas kiel akvo;

ĉar teruraĵo, kiun mi timis, trafis min, kaj tio, pri kio mi estis maltrankvila, venis al mi.

Mi ne havas trankvilon, mi ne havas kvieton, mi ne havas ripozon; trafis min kolero.”

(Hiob 3,3-26)

Kiel ajn, tie, kie oni trovas ĉu poezian ĉu filozofian ĉu religian profundon, oni nepre trovas ankaŭ malesperiĝon pri la vivo, kia ĝi estas. En tio la filozofio de la senco ne diferencas disde la filozofio de la absurdo; kaj en tio ĉi la kredo en Dion ne diferencas disde la ateismo aŭ agnostikismo. La diferenco aperas en sekva paŝo: absurdo kaj ateismo fiksas la homon, kiu tiel perceptas sian vivon kaj la mondon, resti en absurdo kaj malespero, dum la ekkono de la senco kaj kredo en veran Dion finfine, kiel oni ankaŭ legas en la libro de Hiobo, la serĉantan kaj malesperiĝantan homon eltiras el la abismo de la sensenca kaj absurda ekzisto kaj lin savas por eteroj.

Tamen, karaj gefratoj, antaŭ ol rigardi, kiamaniere tiun ĉi demandon klarigas la Kreinto de la tuta vivo mem, la ĉiopova Dio, bonvolu kun mi iomete ludi enkape per la pensoj kaj fantazio, kion ni pli bone, pli saĝe, pli juste kaj kontentige farus, se ni ricevus miraklan ŝancon vivi ankoraŭfoje, fari, kiel oni diras en la lernejo, rebonigan ekzamenon. Kiel profunde la bezono ludi per tiaj pensoj en sia kapo troviĝas en homa naturo, atestas du grandaj religiaj sistemoj, kies grava, eĉ decida parto estas kredo en reenkarniĝon, en migradon de la homa animo: hinduismo kaj budhismo. Tiu religia instruo diras, ke ĉiu homo per sia surtera vivo jam difinas, en kia formo kaj pozicio, per kia destino li naskiĝos denove kaj kiomfoje tio devos okazi, ĝis la animo ne fariĝos sufiĉe pura kaj perfekta por akiri la diecan nivelon de Brahma aŭ ke ĝi solviĝu en nirvano kaj ĉesu ekzisti kiel aparta memo. Alimaniere ol naivaj eŭropaj „disĉiploj” de aŭtentaj aŭ ĉarlatanaj guruoj, kiuj vidas en reenkarniĝo ion ĝojan kaj esperoplenan, la aŭtentaj adeptoj de tiuj religiaj sistemoj en reenkarniĝo vidas nepran malbonon kaj ilia tuta religia praktiko estas provo liberiĝi de nova enkarniĝo, fini por ĉiam la preskaŭ senfinan kurvon de ĉiam novaj aperoj en la fizika mondo.

Sed ne nur ambaŭ grandaj religiaj sistemoj, ankaŭ multaj aliaj kredas en reenkarniĝon. Tiel ekzemple jam bona parto de katolikoj, sed speciale en Brazilo kaj afrikaj landoj, perdis kredon en releviĝon kaj komencis kredi je reenkarniĝo. Tio ne jam estas la katekisma instruo, sed tamen jam la praktika kredo de multaj katolikoj. Sed ĉar laŭdifine unu el kolonoj de la katolika religia kredtrezoro estas la „kredo de la popolo”, verŝajne ne mankas multe, ke iu estonta koncilio proklamos la ĉiam pli rapide kreskantan grupon de reenkarniĝa kredo la normala parto de la katolika kredinstruo.

En reenkarniĝon kredas ankaŭ la nova religia fenomeno, nomata ankaŭ „New Age” (Nova erao), en kiu oni mem kombinas religiajn elementojn el tre diversaj kaj malkongruaj religioj – kaj preskaŭ ĉiam la kredo en reenkarniĝon fariĝas parto de tiel memkonstruita persona religio.

Interese estas, ke iamaniere en reenkarniĝon senkonscie kredas ankaŭ la materiismaj ateistoj. Tiel unu el iliaj pioniroj Frederiko Engels sub la influo de la germana biologo kaj propagandisto de simpligita darvinismo Ernesto Haeckel, kiu enkondukis la strangan nocion „Zellgedächtnis” (ĉelmemoro) kaj poste eĉ pli fabelan de „Kistallseelen” (kristalanimoj), venis al konvinko, ke jam atomoj posedas iaspecan konscion. Same kiel Haeckel kredis, ke la materio kaj la etero (tiu nocio tiutempe ankoraŭ fantomis en kapoj de natursciencistoj) posedas sentojn kaj volon, tiel ankaŭ Engels kaj post li Lenin per tiu ĉirkaŭvojo sin regalas per certa espero, ke la homa kerno ne estas nepre perdita, eĉ se tiu ĉi sunsistemo iam estos detruita. Ne nur la monisto Haeckel, kiu tion sciis kaj tion ne kaŝis, ankaŭ ĉiuj tiel nomataj „sciencaj materiistoj” kaj per tio ateistoj estis, strikte dirite, panteistoj – kaj ĝuste la panteismo estas la filozofia bazo de la koncepto reenkarniĝo en unuopaj religioj.

Bone: Se mi povus ankoraŭfoje vivi... Kion mi do ŝanĝus en eventuala ripeto de mia vivo, se donita? Mi parolu pri mi mem, ja la revado pri tio, kion fari alimaniere, estas samtempe akuzo de la ĝisnuna vivo – kaj akuzon oni direktu unue al si mem! Certe mi estus alia filo al mia patro kaj al mia patrino, ol mi en vero estis. Mi provus esti dankema, estima, obeema – do ĉio inverse ol mi en vero estis. En lernejo mi uzus la tempon kaj estimus miajn instruistojn. La unuan emfazon en mia lernado mi dediĉus al la vorto, kiu priskribas la homon, eldiras liajn demandojn kaj en ĝi ricevas respondojn; estante unue instruo pri legi kaj skribi, poste pri la gramatiko kaj ortografio, poste ankaŭ pri logiko kaj hermeneŭtiko – kaj la duan al nombroj, kiuj priskribas la fizikan mondon kaj esprimas ĝian internan strukturon, rilatojn kaj dimensiojn; estante unue nombrado kaj kalkulado, poste aritmetiko kaj algebro, geometrio kaj alta matematiko, fine ankaŭ matematika logiko kaj kibernetiko. Apud deviga lernejo mi serĉus al mi majstron de iu tradicia metio, por lerni ĉe li laboron permane; kaj samtiel maestron, por lerni ĉe li la muzikon. Tiel mi fokus solidajn fundamentojn de mia profesia kaj kultura vivo, de mia seksa kaj karaktera aparteco. Se viro, mi provus iĝi ne nur laboristo, kiu ion scipovas, sed ankaŭ la karaktero, kiu ion volas kaj en tio obstinas; kaj la kavaliro de unu virino kaj la patro de multaj infanoj; se virino, vestalo de la hejma vajro kaj la damo de unu viro, patrino de multaj infanoj. Ambaŭkaze la infano de la Ĉiopova, Lia adoranto kaj plenumanto de Lia vorto.

Tia estas la revo de la homo, kiu deziras al si vivi ankoraŭfoje por povi vivi, kiel li opinias ke estus prave vivi. Sed la providenco kaj saĝeco de la vivanta Dio scias, ke mi ankaŭ la duan fojon, se tia ŝanco estus donita, vivus aĉe, sen racio kaj rekono, same malbone kaj malakorde kun la volo de Dio kiel la unuan fojon. Ankaŭ la duan fojon mia patro estus la diablo kaj ne Dio, mia naturo estus ankaŭ la duan fojon korupta. La homo ne estas riparebla kaj ne povas plaĉi al Dio pere de ripeto de sia vivo laŭ la maniero de fabelo pri reenkarniĝo. Dio elpensis ion senkompare pli bonan!

La solvo, antaŭvidita de Dio, estas precize priskribita en la evangelio laŭ Johano. Ni malfermu ĉe la 3-a ĉapitro, kie aperas tre interesa persono, la tre klera fariseo Nikodemo, kiu dumnokte, kvazaŭ jam tiam regus cirkonstancoj, kiajn la orienta Eŭropo konis dum preskaŭ 50 jaroj sub la komunisma reĝimo:

„Estis viro el la Fariseoj, nomata Nikodemo, ĉefo inter la Judoj; tiu venis al li nokte, kaj diris al li: Rabeno, ni scias, ke vi estas instruisto, veninta de Dio; ĉar neniu povas fari tiujn signojn, kiujn vi faras, se Dio ne estas kun li. Jesuo respondis kaj diris al li: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio. Nikodemo diris al li: Kiel povas homo naskiĝi, kiam li estas maljuna? Ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino kaj naskiĝi? Jesuo respondis: Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio. Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito. Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj. La vento blovas, kie ĝi volas, kaj ĝian voĉon vi aŭdas, sed vi ne scias, de kie ĝi venas kaj kien ĝi iras; tia estas ĉiu, kiu estas naskita de la Spirito.

Nikodemo respondis kaj diris al li: Kiel povas tio fariĝi? Jesuo respondis kaj diris al li: Vi estas la instruisto de Izrael, kaj ĉu vi ne scias tion? Vere, vere, mi diras al vi: Kion ni scias, tion ni parolas, kaj kion ni vidis, tion ni atestas; kaj vi homoj ne akceptas nian ateston. Se mi aferojn surterajn diris al vi, kaj vi ne kredas, kiel vi kredos, se mi diros enĉielajn? Kaj neniu supreniris en la ĉielon, krom tiu, kiu malsupreniris de la ĉielo, la Filo de homo, kiu estas en la ĉielo. Kaj kiel Moseo levis la serpenton en la dezerto, tiel devas la Filo de homo esti levita; por ke ĉiu, fidanta al li, havu eternan vivon. Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon. Ĉar Dio sendis Sian Filon en la mondon, ne por juĝi la mondon, sed por ke la mondo per li estu savita. Kiu fidas al li, tiu ne estas juĝata; sed la nekredanto jam estas juĝita, ĉar li ne fidas al la nomo de la solenaskita Filo de Dio. Kaj jen estas la juĝo: ke la lumo venis en la mondon, kaj la homoj amis la mallumon pli ol la lumon, ĉar iliaj faroj estis malbonaj. Ĉar ĉiu, kiu faradas malbonon, malamas la lumon, kaj ne venas al la lumo, por ke liaj faroj ne estu malaprobataj. Sed tiu, kiu faras la veron, venas al la lumo, por ke liaj faroj estu montrataj, ke ili estas faritaj en Dio” (Joh 3,1-21).

Ĉu ni ĝuste legis? Ĉu ni ĝuste aŭskultis, karaj gefratoj? Dio donis al ni pli ol fabelon. Li donis al ni la eblecon ripari ĉion, kion ni en nia vivo misfaris kaj pekis, sen ke ni devus la estintajn situaciojn ankoraŭfoje travivi kaj ilin per propra peno ripari. Li donis al ni ion similan kiel la inĝenieroj de komputilaj sistemoj donis al ni en la formo de grafika laborsurfaco, ke ni povas helpe de muso la nedeziratan datenon simple forporti en korbon por rubaĵoj aŭ ke ni povas la maltaŭgan datenon simple anstataŭi per nova plibonigita versio; ke ni povas la malnovan kaj ne tre taŭgan programon kaj eĉ operacian sistemon anstataŭi per pli bona, pli perfekta. La diferenco tamen troviĝas en tio, ke mi mian komputilon per ĉiuj tiuj eblecoj daŭre okupas per programoj kaj datenoj neperfektaj. Alivorte dirite, niaj komputiloj estas katolikaj. Ili postulas daŭran plibonigadon, sed neniam kondukas al la perfekta stato. Finfine la tuta klopodo restas vana. Se troviĝus eterna vivo por komputilj kaj iliaj enhavoj, neniu el tiuj mirindaj fabrikoj sukcesus veni en la komputilan ĉielon, ja ili antaŭ la granda Inĝeniero de la kreitaro montriĝus daŭre neperfektaj kaj plenaj de eraroj – kaj Dio en la ĉielo toleras neniun eraron kaj neperfektaĵon!

Ĉar do Dio de la tuta komenco scias, ke la homo, eĉ se li ricevus ŝancon de reboniga ekzameno, falus ankaŭ la duan fojon kaj ĉiun sekvan eventualan fojon, kiel en la lerneja tempo okazis ankaŭ en mia kazo; ĉar Li de eterno scias, ke la homo ankaŭ tiam, se li povus ankoraŭfoje vivi, vivus malprave kaj li ne liberigus sin de la peko kaj ĝiaj konsekvencoj kaj aparte de ĝia plej destina konsekvenco, la eterna morto, Li en sia saĝo decidis, ke: „*kiel estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo*” (Heb 9,27) – sed ke li povas ĉion, kion li dumvive difektis kaj detruis kaj makulis, disponas al la riparo ĉe la Kreinto. Kaj Dio naskas lin denove, kaj la homo tiel fariĝas en la okuloj de Dio senmakula, ĉar observata tra Kristo, en kiu li nun troviĝas: „*Tial se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo; la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj*” (2 Kor 5,17).

Do ne: se iu estas bonkora kaj nenion ŝtelis kaj neniun murdis. Ankaŭ ne: se iu fidele dum sia tuta vivo frekventas ritojn en sia eklezio, pagas dekonon aŭ eĉ pli kaj flegas amikan rilaton kun sia paroĥestro aŭ pastoro. Ankaŭ ne, se li plene engaĝiĝas por la bono de malriĉuloj, se li fondas kristanan partion aŭ funkciumas en la organizaĵo *Caritas*. Eĉ ne, se li agnoskas la veron de la biblia instruo kaj adiaŭas de la falsa eklezio, ĉar ĝi falsifas la evangelion, eĉ ne, se li fervore vizitas kristanajn komunumojn kaj ekleziojn kaj tie anoncas la vorton de Dio, kiel mi tion faras. Ankaŭ per tio oni ne povas transdoni sian vivon al la riparo, pli ĝuste dirite novnaskigo ĉe Dio, kvankam multaj el la menciitaj faroj al Dio plaĉas kaj Li per sia kompenso ne avaros. Sed la pago ne estas la sama afero kiel la savo. En malliberejo certa prizonulo povas pro sia bona konduto, kooperaciado kaj bona modelo por aliaj prizonuloj ĉe la direkto de la malliberejo akiri apartan honorarion, premion, privilegion. Sed pro tio li ne

estos liberigita kaj proklamita senkulpa antaŭ la leĝo! Kaj tio ĉi estas la temo! La vorto de Dio sendube diras: „*Se iu homo estas en Kristo...*” Ne, se li klopodas, ne se li estas fidela kaj bonintenca, ne se li neniun prirabis kaj murdis, sed: se li estas en Kristo!

Ŝajnas, ke por la peka homo neniun peno, neniun askezo, eĉ neniun ofero estas tro peza, nur ke li havu impreson, troviĝi survoje al la savo. Mi parolas pri tiuj, kiuj scias, ke ili renkontos juĝon kaj ili ne estas indiferentaj, kie kaj kiamaniere ili ekzistos en la eterno: ĉu kun Dio aŭ for de Dio, to en la societo de Satano kaj liaj demonoj. Sed ankaŭ tiuj homoj verŝajne faras minoritaton. Ŝajnas, ke la plimulto da homoj, almenaŭ niatempe, estas alfronte al propra eterno komplete indiferenta. „Do, mi marŝos en inferon...” diris al mi sinjorino, kiam mi provis ŝin afable atentigi pri tio, ke ŝi sian ekzamenon antaŭ Dio ne povos sukcese fari per argumentoj, ke ŝi modele flegis sian ĝardenon kaj ke ŝiaj tekstilaĵoj estas senriproĉe lavitaj kaj gladitaj en la ŝranko. Tiu ĉi indiferento kaj ne la krozo de naturmedio, ekonomia krizo, same birdgripo aŭ nove porkogripo, estas nuntempe la plej grava problemo kaj tragedio de la homaro.

Do, mi parolas pri tiu minoritato, kiu tamen havas deziron atingi savon – kvankam ankaŭ tiu grupo troviĝas sur falsa vojo, provante realigi tion en propra kapacito kaj klopodo, helpe de sia kompatinda moralo kaj deco, de sia en eklezioj desegnita pieco. Sed Dio ne invitas en la ĉielon kaj Li ne akceptos moralajn kaj decajn kaj deekstere piajn homojn, sed ekskluzive nur la konvertiĝintajn pekulojn!

Kiamaniere do atingi la internon de Kristo kaj troviĝi tie, por tiamaniere atingi la ĉielan regnon, kio apud la Dia gloro estas la nura celo kaj senco de la homa vivo? Ankaŭ tion ĉi Dio konceptis kaj starigis tiel simple, ke evidente ĝuste tiu ĉi simpleco kaj facileco por la peka homo estas tioma morala kaj mensa skandalo, ke li ne povas kaj ne deziras paŝi trans tiel malalta sojlo kaj li prefere daŭre sin turmentas per sia falsa pieco, moraleco kaj dececo, kvankam li de ĉiam ricevas anoncadon, ke la infero estos plena de tiel piecaj, moralaj kaj decaj, sed ne novenaskitaj homoj. Kaj kia estas tiu ĉi por nia falinta koro kaj nia falinta racio tiel simpla vojo, kiamaniere veni en Kriston kaj per li atingi la savon? La afero estas vere tiel skandalece simpla kaj facila, ke mi troviĝas en embaraso, kiamaniere tion diri, por ke mi de tiu nure nepra paŝo en la onia vivo ne barus ankaŭ tiujn, kiu eble ĵus sin preparas por fari ĝin. Oni devas scipovi ĝuste tiom da plej alta teologio kaj Dia saĝo, iaspeca Dia filozofio; tiom da plej alta, Dia matematiko, tiom da Lia fiziko kaj metafiziko, tiom da ĉiuj aliaj scioj de Dio kaj lingvoj, en kiuj tiuj ĉi scioj estas revelaciitaj, kiom da ĉio-ĉi scipovis la analfabeta kulturprimitivulo kaj kruela rabisto, krucumita je la dekstra flanko de nia Sinjoro Jesuo. Li diplomekzameniĝis el sia kompleta vivo, tiel forte misgvidita kaj malfeliĉa vivo, per la plej bona noto, per *summa cum laude*, kiu ne havas komparon en la historio de Dia savprojekto. Li estas la ĉampiono inter la savitaj, tiel dirite la protosavito! La formulo de lia diplomlaboraĵo, en la lasta ebla momento transdonita sur la kruco, antaŭ la soldatoj rompus liajn gambostojn kaj li tion ne povus plu fari, de lia pli ol magistra aŭ doktora diseraĵo, envere habilitiĝo, kiu en la kreita kosmo estas tute ebla, estas pli bone trapensita ol ni diru la fama formulo de Einstein pri la rilato inter la maso, energio kaj lumrapideco. Tiu ĉi plej alta formulo, per kiu oni povas akiri savon, tekstas en la homilia aranĝo tiel: $AP (PP + PS) = S$. Dirite en normala lingvaĵo: Agnosko de la peko multiplicate per peto por pardono plus peto por savo donas la savon. Per tiu ĉi formulo, la unuan fojon, kiel raportas la evangelio, uzita ĵus dum la krucumado, dum la pendado sur la kruco konforme al la leĝo kaj per la peto, adresita al la Sinjoro, kiu pendis samtiel sur la kruco, sed en kontraŭo al la leĝo, la dekstra rabisto paŝis rekte en Kriston – kaj la reston aranĝis kaj faris Dio mem.

Bone, ian principan pekemon estas preta agnoski preskaŭ ĉiu. Ankaŭ mi estas pekema homo – kiel facile oni tion diras kaj kiom ofte oni tion diras, speciale, se oni volas preterkuri tiujn, kiuj sin preparas por nin akuzi aŭ riproĉi. Oni estas ankaŭ preta peti en la gramatika formo de 3-a persono, kiel tio okazas en la homa pekkonfesejo en certaj eklezioj. Sed la peton por ricevi la savon oni jam ne atingas plu. Oni opinias sufiĉe klopodi agnoskante sian abstraktan

kaj ĝeneralan pekemon kaj petante ĉe la homa konfespatro, ke tiu la tria, Dio, nin pardonu. Sed nur tre malmultaj estas pretaj komenci per agnosko, ke ili antaŭ la senfina kaj absolute justa Dio estas nek por dimensio de unu haro pli bona ol la dekstra aŭ maldekstra rabisto; nur esceptulo estas preta siajn konkretajn pekojn agnoski al Jesuo, do al la dua persono – la dua en la Dia triunuo kaj la dua en la gramatika rilato de senpereco inter la pekulo kaj la savanta Jesuo – kaj nur esceptulo atingas rekonon, ke oni devas peti por la savo kaj ĉe tio eldiri sian kredon, ke Jesuo Kristo posedas la povon kaj komision, volon kaj gracon, la petitan savon doni.

Ĉu do oni rezignu pri la revo, kion oni emus ripari, plibonigi, alimaniere fari, se oni povus ankoraŭfoje vivi? La Dia realo tamen estas pli bona, ankaŭ senfine pli poezia kaj ne nur savodona ol eĉ tiel impeta kaj kolora homa revo. La racia homo prenos tion, kio estas pli bona kaj daŭras pli longe. Sed tio, kion proponas al ni Dio, ne esta nur io pli bona, sed ĝuste la plej bona el ĉio, kio povs esti. Kaj la daŭro ne estas nur pli longa, sed ĝi ne havas finon. Torao, do la kolekto de 5 libroj de Moseo, formulas la klaran proponon de Dio: „*La vivon kaj la morton mi proponis al vi, la benon kaj la malbenon; elektu la vivon, por ke vi vivu, vi kaj via idaro*” (5 Mos 30,19). La libron oni elektas tiel, ke oni igas la malnovan Adamon en si morti kaj lin entombigi kun Kristo, por ke per Kristo denove leviĝas la novnaskita homo, kiu ne bezonas ankoraŭfoje vivi sur la tero por korekti sian vivon kaj ĝin ripari, ĉar jam ĉion faris nia Sinjoro Jesuo – Amen!

Formulita en julio 2009

Vinko Ošlak